

# Sennaciulo

Dosiere:  
**Sano: ĉu perfortita homa rajto?**

*Kaj jen tute freŝa  
bonstata reno;  
baza aŭkcia prezo: 70 000€.  
Kiu ĝin akiros ?*



Kulturpaĝe:  
**Pri Kristnasko**

Kiel kristnaska KOBOLDO akiris sian  
**RUGAN**  
mantelon





# Plia projekto de la eldona fako kooperativa: Liberaj programoj, faktoj kaj dokumentoj

La eldonkooperativo de SAT antaŭvidas eldonon de 150-paĝa libro, en la serio "Faktoj kaj dokumentoj", pri liberaj programoj, okaze de la venonta SAT-kongreso, en aŭgusto 2008.

Detala enhavoskizo, kaj regulaj informoj pri la evoluo de la projekto estos haveblaj ĉe:

<http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/spip.php?rubrique15>

La libro estos dividita en tri grandaj partoj:

- traduko de kelkaj fundamentaj dokumentoj, verkitaj de pioniroj de la liberprogramista movado (por tiu ĉi parto estos utiliga la partopreno de denaske anglalingvaj kamaradoj);

- prezento de diverstipaj konkretaj atingoj de la liberaj programoj, kaj de la filozofio pri "liberaj permesiloj";

- sintezo, komune verkota, eventuale kunlabore kun nacilingvaj asocioj por la disvastigo de liberaj programoj.

## Kial ni elektis ĉi tiun temon?

Vole nevole, la uzo de informadikaj iloj pli kaj pli trudiĝas en niaj ĉiutagaj vivoj. El tio sekvas, ke estas grava kleriga laboro fareda por instrui al laboristoj mastrumi tiujn potencajn ilojn, kiuj povas esti tre efikaj emancipiloj, sed ankaŭ povas esti tre efikaj subpremiloj, se ilin regas nur la mastraro. Trudvendado, spionado, atencoj al la privata libereco ne estas nur teknikaj problemoj, sed koncernas ĉiujn, eĉ la plej nekomputilemajn homojn.

Do, tute ne temos pri manlibro pri liberaj komputilaj programoj, sed pri libro normale komprenebla eĉ de analfabetoj pri informadiko. Tial estos tre bonvena la partopreno de kamaradoj, kiuj tute ne fakas pri la temo, por certigi ĝustan ekvilibron inter teknika precizeco kaj ĝenerala komprenebleco.

## Kiel kontribui?

Kopiu la jenan formularon, kaj resendu ĝin al [eldonkoop@satesperanto.org](mailto:eldonkoop@satesperanto.org) aŭ

papero al SAT - Eldona Fako Kooperativa, 67 av Gambetta, FR-75020 Paris.

Por esti ĝustatempe presita, la manuskripto devos esti finpreta komence de junio, do ĉiuj partoj devos esti finredaktitaj komence de majo.

-----

- nomo:

- retadreso:

- mi akceptas, ke mia nomo aperos en la kontribuanto listo kun la jena subskribo:

- mi pretas kontribui per
- \* (kun)verkado de la parto pri:
- \* tradukado el la jena lingvo:
- \* provlegado de tekstoj:
- \* kovrilpaĝa/dorsflanka ilustraĵo:

- jen pliaj sugestoj miaj:

-----

La eldona fako kooperativa de SAT  
<http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/>



Karaj gekamaradoj,

Jen la decembra numero, kun ampleksa dosiero pri sano. Kun ĝi vi ankaŭ ricevas la aliĝilon por la venonta SAT-kongreso, do ne hezitu frue enskribiĝi, por helpi al la planado de la OKK. Ne forgesu, ke la PK atendas viajn proponojn pri diskutprelegoj por la 6 sociaj forumoj. Kiel jam anoncote, la venonta Sennaciulo estos duobla numero, 32-paĝa, por elprovi alian formulon, malpli streĉan por la redaktantoj, kaj do pli poluritan kaj pli agrablan por la legantoj.

La venontaj dosiertemoj estos:-

- en januaro/februaro:

### **Kelkaj aspektoj de nuntempa agrokulturo**

Kontribuojn sendu al: BÉTEAU Robin, chez Bulanat, Quartier Oussan, FR-65130 Escots

rete: [robin.beteau@laposte.net](mailto:robin.beteau@laposte.net)

- en marto:

### **Naciecaj problemoj**

Kontribuojn sendu al: MICKLE Gary, Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin

rete: [gmickle@nexgo.de](mailto:gmickle@nexgo.de)

Ĉar finiĝas la jaro, ankaŭ venas la tempo repagi vian kotizon. Se eble, bonvolu tion fari akurate, kaj instigi viajn samrondanojn fari same. Vi ankaŭ povas profiti la okazon por samtempe aĉeti SAT-eldonaĵojn.

Kamaradece,

La redaktoskipo

# **Sano : perfortita homa rajto**

**Enkonduke:**

## **Rajto perfortita, ade kaj daŭre.**

Tiu dosiertitolo, pro ioma ambigueco de la vorto « perfortita », meritas klarigon : ja ne temas pri « per forto konkerita » rajto, sed pri ĉiutaga primokado kaj vola fuŝado de principo mondscale agnoskita, laŭ kiu ĉiu rajtas ĝui bonstaton korpan kaj mensan sine de tion certigkapabla socio.

Se la nuna kapitalisma sociordo rajtigas nin esti sanaj (por kapabli labori ĉiam pli), ĝi monpunas nin, se okazas, ke ni malsaniĝas (ĉar tiam ni ne plu laboras por plikresko de la nacia enspezo sed male parazite elspezigas monon per sinkuracado). Tiel ekzemple nun trudiĝas en Francio pli kaj pli tiu franĉiza sansistemo, per kiu la registaro pretendas igi la malsanulojn memrespondecaj civitanoj, kaj do rifuzas repagi al ili la aĉeton de kuraciloj kaj la koston de hospitalaj servoj.

Do sano iĝas nun pli kaj pli malferma merkato, kiun asekurentreprenoj kaj apotekindustrio jam preskaŭ komplete regas, devojigante sanon el tutmonda homrajto al riĉula privilegio.

Ekzistas ŝtataj leĝoj, kiuj punas homojn pro « nehelpado al vivendanĝerigita persono ». Nu, ĉiutage mi preterpasas senhejmulojn surstrate almozpetantaj kaj proponas nek domon, nek manĝon, eĉ ne donas kelkan moneron al ili. Do ĉu pro tio mi estu leĝe punata ? Se jes, certe almenaŭ duono de la popolo jam troviĝus en malliberejo. Sed feliĉe aliaj

leĝoj postulas, ke oni ne rajtas almozpeti kaj ne rajtas ŝteli (eĉ se la reganta klaso



*Senhejmuloj vivas en ege sanmalfavoraj kondiĉoj*

el *Wikipedia*: <http://eo.wikipedia.org>

priŝtelis onin tiagrade, ke tio estus sola rimedo por vivteni sin), do bone, tiuj trampoj estas eksterleĝuloj, kiuj certe meritas sian sorton ! Pruvo pri tio estas, ke eĉ iuj urbestroj havas brilajn ideojn, kiel krei belajn estetikajn benkojn, sur kiuj nur unuopaj homoj apenaŭ povas surpugiĝi kaj ĉefe neniel kuŝiĝi por dormi, aŭ plej moderne ĥemiaĵojn, kies akra odoro fuĝigas senhejmulojn, kiuj tro ofte restas en sama stratangulo....

Sano estas tiel ĝenerala nocio, kiun influas tiel multaj eksteraj faktoroj, ke ne eblas pritrakti ĝin sen devojigi al nerekte ligitaj temoj, kiuj iom ebligas kompreni kaŭzojn kaj konsekvencojn ligitajn al la ĉefa temo. Ĉi tie troviĝas iom da pripensiga materialo, kiu instigu pli funde prikonsideri la problemon kaj eventualajn vojojn al ties solvo.

Vito Markovo

## **Sennaciulo**

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redakcejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: [satesperanto@free.fr](mailto:satesperanto@free.fr); TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org>; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN :FR41 1000 0101 2342 2K02 064 - BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

**Plenum-Komitato de SAT :**

Prezidanto : Jakvo Schram

Ĝenerala Sekretario : Kreŝimir Barković

Kasistino : Thérèse Sabatier

Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Cyril Orsingher, Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaŝigisto: Kreŝimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redakcejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/alij landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

